



Brit-eliro (Brexit) estis la reala alvoko al ĉiuj regantoj

Responde al demandoj de junularo dum la renkontiĝo kun fokolaranoj en Sporta Centrejo de Dungarvan, s-ino **Nuala O'Loan** diris: "Mi pensas ke en politiko sentiĝas doloriga manko de mizerikordo. Tio estas agad-kampo malfacila al tiuj politikistoj, kiuj volas vivi juste kaj ami ĝentil-kore.



La intervjuo okazis dum la ĉiujara fokolara renkontiĝo nomita Mariapolis, en Dungarvan, havenurbeto sur la suda marbordo de Irlando.

Brit-eliro estis la duobla reago, unue al membreco de Britujo en Eŭropa Unio kaj ĝia senfaca burokratio kaj due al problemoj de migrantoj kiuj amase eniras nian socion. Kaj kiam ili ne povas tuj viziti kuraciston, ili sentas sin marĝenigitaj kaj pli malriĉaj. Sed, antaŭ ĉio, nia popolo diris: "tio estas jam tro".

Tiel demokratio fakte funkcias ĉar, kvankam nia lando (Norda Irlando?) ne foriras el EU, mi vidas ke Brit-eliro estas la defia mesaĝo al tiuj regantaj la Union: "Vi faris tion malbone tra multaj jaroj kaj nun estas la tempo por ŝanĝoj".

S-ino O'Loan partoprenis en debatoj de la parlamento post kiam oni decidis eliri el EU. Ŝi aŭdis la voĉojn de 116 parlamentanoj, inter kiuj multaj diris: "*Ni devas pripensi ĉion tre serioze kaj ŝanĝi manieron de nia regado. Unuflanke, ni ne volas forlasi la Union, sed aliflanke ni ne povas havi alian referendumon. Nia popolo jam faris la decidon kaj ni devas ĝin plenumi.*"

La generacio, kun kiu kreskis s-ino O'Loan, havis pli da sekureco en la vivo: stipendion dum la universitataj studoj, konstantan laboron kaj pension. Kiu laboris, tiu vivis bone. Hodiaŭ la junaj homoj ne ofte trovas stabilan laboron kiu post jaroj garantius por ili pension. En tia situacio, malfacilas por ili aĉeti domon en kiu junaj familioj povus vivi "*Tial do, ni povas diri ke ni, kiel politi-kistoj kaj la registaroj, ne plenumis siajn devojn, promese deklara-ritaj al niaj voĉdonintoj*" – ŝi aldonis kaj esprimis la esperon ke politikistoj el diversaj partioj povos demeti siajn diferencojn kaj kunlabori por la komuna bono (lat: *pro publico bono*).



Demandita pri la krizo de refuĝintoj, S-ino O'Loan respondis: "Unue oni devas halti organizitan kontraŭ-bandon de homoj translime. Tamen kiam ni lernas historion, montriĝas ke kelkaj okcidentaj registaroj kaj kompanioj ekspluatis dum jarcentoj tiujn landojn, kies loĝantoj vivas hodiaŭ en malriĉeco. La riĉa kapitalista mondo prenis iliajn mineralojn, diamantojn kaj diversajn produktojn. Pro tio ni devas helpi en konstruado de tiuj naciaj ekonomioj tiel, ke neniu devos forlasi landon de siaj gepatroj". Spite al trauma, malĝojo kaj dramoj kiujn ŝi vidis dum sia laboro, s-ino O'Loan neniam perdis esperon.

Kiel skribis unu socia gvidanto, la Sinjoro promesis renaskiĝon, similan al ĉiu arbofolio en printempo. Ni povas vidi ke la vivon konstante renovigas amo, kiu certe venkos malbonon. Ni devas nur kunlabori kaj ne maldiligenti.

Post la renkontiĝo, unu el la partoprenintoj skribis: "Mi sentis kvazaŭ ĉe la komenco de Fokolara Mova-do kiu naskiĝis en tempo de la dua mondmilito, dum aviadila bombado. La Brit-eliro okazis ĝuste nun, kiam plibo-niĝas rilatoj inter la Norda Irlando kaj la Respubliko de Irlando. (Norda Irlando geografie troviĝas sur la Irlanda Insulo, sed politike ĝi apartenas al Britujo.) Ĉi tiu eks-membriĝo de Britujo kreas malcertecon en ĝiaj rilatoj kun la Irlanda Respubliko, kiu plu restas UE-membro. Malgraŭ ĉio, ni daŭrigos nian kunlaboron por unueco".



Baronino Nuala O'Loan estas publike respektata figuro de Norda Irlando. En jaroj 1999-2007 ŝi laboris kiel advokato /rajt-protoktanta, kiu traktis plendojn de civitanoj kontraŭ fuŝa aŭ nejusta funkciado de la administraj organoj. En 2009, oni elektis ŝin al Ĉambro de Lordoj" (House of Lords – la dua instanco de brita parlamento) kaj tiam ŝia honora titolo estas *Damo Nuala O'Loan*. La intervjuon faris du gejunuloj, Brónagh MacGuinness and Ronán Costello.

Fortoj de la vivo

Tatuaĵoj



Dumvojaĝe en vagonaro, mi sidis apud knabino kaj junulo; ambaŭ estis kovritaj per tatuaĵoj kun satanaj simboloj. Mi delonge ŝatas trovi ion pozitivan en aliaj homoj. Tia inklino pensigis min tiumomente, ke la duopo certe havas iun kaŭzon por tiel "ornami" siajn manojn. Post kelkminuta hezitado, mi aŭdacis demandi kion signifas tiuj simboloj. Iliak okuloj ebrilis kaj la surprizita geduo respondis per mildaj voĉoj: *"Ni dankemas ke vi demandis nin pri tio. Kutime homoj prijuĝas nin negative aŭ – en plej bona kazo – ignoras nin. Sed ni ne estas tiel malbonaj kiel ni aspektas. Ni volas nur frape vekigi ĉi tiun paralizigitan socion kiu vivas supraĵe, sen morala spino"*. (M.I. - Francio)

Solidareca gesto

Telefone mi ricevis la informon, ke parenco de nia kunlaboranto grave malsaniĝis. Oni petis ke mi vizitu tiun homon sed, pro la vetero, mi sentis min tre laca. Rigardante je mia edzino, mi komprenis ke tio ĉi estas la okazo daŭrigi nian vivstilon en helpado de la aliaj. Mi foriris al tiu malsanulo kaj veturigis lin al hospitalo kie la kuracistoj tuj lin prizorgis. Mi revenis malfrue hejmen, kie atendis min la edzino kun vespermanĝo. Kvankam ni ne parolis multe, tamen io pliprofundigis niajn interrilatojn. Pro tiu gesto de solidareco, ni eksentiĝis pli riĉaj. (D.R. - Kolumbio)

"**Nova Urbo**" (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolara Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996. Sekvajare, dum la vizito de Ch. Lubich en Usono (majo 1997), ni havis la okazon renkonti ŝin kaj peti pri la konsento eldonadi la bultenon "Città Nuova / New City" ankaŭ en Esperanto.

Kun helpo de pola esperantisto kiu doktoriĝis en Italio pri juro kaj komunikado, ni klarigis ke Esperanto funkcias same kiel aliaj naciaj lingvoj kaj bone utilas al internacia kompreno. Samtage, ni ĝoje ricevis ŝian aprobon kaj ekde tiam "Nova Urbo" aperas kaj informas pri pozitivaj eventoj en diversaj partoj de la mondo. Akceptis ĝin bone la esperantistaj legantoj, ĉar ankaŭ nia Internacia Lingvo kontribuas al amikeco kaj paco.



Città Nuova /New City eldoniĝas ĉe Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj aperas en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO - *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO - *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILO - *Ciudade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Syjat*; ĈILIO - *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLOMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO - *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enad Värld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO - *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.

Aldone kun la antaŭa artikolo, ni prezentas la kanton kiu tuŝas alian flankon de la Eŭropa krizo. Kiel montras la statistikoj, post jaro 1989 en Meza kaj Sudorienta Eŭropo oni fermis multe da modernaj fabrikoj. Rezulte, pli ol 10 milionoj da junaj homoj devis forlasi siajn domojn kaj familiojn por eklabori en pli riĉa, okcidenta parto de la kontinento. Pri tio rakontas ĉi tiu kanto, kvankam verkita antaŭ kelkaj jardekoj, tamen plu aktuala nuntempe.

"Greka vino"

Originale: *Griechischer Wein*
greke: *Ελληνικό κρασί - Phile Kerna krassi*
ang: *Greek wine* / hisp: *Vino griego*

"Greka vino" estas tre konata kanto de la aŭstria kantisto Udo Jürgens, kiu en sia 21a jaraĝo komponis sukcesan kanton "Merci, Chérie" (*Dankon, karulino*) kaj venkis en la mondfama Festivalo de Eŭrovizio (Eurovision Festival).



Sur la supra foto: Udo Jürgens post la "Eŭrovizion-66".
Apude staras venkistino de la antaŭa konkurso, F. Gall.

"Greka vino" estis unue kantita de U. Jürgens: <https://www.youtube.com/watch?v=vSrru0UE1ic>
Li kantis ĝin ankaŭ en franca lingvo: <https://www.youtube.com/watch?v=s3-zATHdui8>



Post kelkaj jaroj, Udo pasigis libertempon sur greka Rodos-insulo kio inspiris lin komponi la vere internacian ŝlagron "Greka vino" (*Griechischer Wein*). Lia impresio estis tiel forta ke Udo bezonis nur 20 minutojn por krei la melodion.

Sed pasis pli ol du jaroj, antaŭ oni trovis homon kiu verkis taŭgan tekston por tiu melodio. Tio estis Michael Kunze, kiu proponis ke ĝi temos pri grekaj gastlaboristoj en la germana industria Ruhr-regiono.



Feliĉaj jaron kun la familio

Kiam la "Greka vino" aperis sur sondisko, ĝia populareco superis la supozojn de Jürgens kaj fariĝis tuj nekredebla sukceso en tri germanlingvaj landoj: Aŭstrio, Germanio kaj pliparto de Svislando. La kanto ravigis multajn muzikistojn eksterlande kaj baldaŭ oni komencis ĝin kanti en aliaj lingvoj, i.a: franca, greka, hispana, pola, portugala, nederlanda.

Ĉi tie ni prezentas la kelkajn variaĵojn:

Portugale / Paulo Alexandre – https://www.youtube.com/watch?v=mf3HT1_UUAY

Pole / Anna German – <https://www.youtube.com/watch?v=2YupiG5Tu0g>

Angle / Al Martino – <https://www.youtube.com/watch?v=vfzuFU84eds>

Hispane / koruso – <https://www.youtube.com/watch?v=PolxSa3HHeU>

"Greka vino"

tekstoj



Originalo en la germana lingvo

Es war schon dunkel
Als ich durch Vorstadtstraßen heimwärts ging
Da war ein Wirtshaus
Aus dem das Licht noch auf den Gehsteig schien
Ich hatte Zeit und mir war kalt, drum trat ich ein

Da saßen Männer mit braunen
Augen und mit schwarzem Haar
Und aus der Jukebox erklang Musik
Die fremd und südlich war
Als man mich sah
Stand einer auf und lud mich ein

*Griechischer Wein ist
So wie das Blut der Erde
Komm', schenk dir ein
Und wenn ich dann traurig werde
Liegt es daran
Daß ich immer träume von daheim
Du mußt verzeih'n*

*Griechischer Wein
Und die altvertrauten Lieder
Schenk' nochmal ein,
Denn ich fühl' die Sehnsucht
Wieder, in dieser Stadt
Werd' ich immer nur ein Fremder sein, und allein.*

Und dann erzählten sie mir von grünen Hügeln,
Meer und Wind
Von alten Häusern und jungen Frauen,
die alleine sind
Und von dem Kind das seinen Vater noch nie sah

Sie sagten sich immer wieder
Irgendwann geht es zurück
Und das Ersparte genügt zu
Hause für ein kleines Glück
Und bald denkt keiner mehr daran
Wie es hier war

Griechischer Wein . . .

Senrima E-traduko

Estis mallumo, mi vadis en apudurbaj stratoj
por reveni hejmen. Survoje mi ekvidis tavernon,
ies lumo ekbrilis sur trotuaro.
Mi sentis malvarmon kaj havis multe da tempo,
tien do mi eniris.

Interne sidis viroj brunokulaj viroj
kun nigraj haroj.
El muzik-ŝranko aŭdiĝis
ekzotikaj melodioj de la Sudo.
La viroj min ekvidis
kaj invitis al sia tablo.

Rekantaĵo:

*Jen greka vin' kiu
similas al sango de la tero.
Venu, amiko
por dolĉigi la malĝojon
kaj pardonu ke ni ĉiam
revas pri nia hejmoj.
Ĉar greka vin'
memorigas nin
pri malnovaj grekaj kantoj.
Tiam ni sentas denove sopiron
dum en ĉi tiu urbo
mi estos ĉiam fremda kaj soleca.*

Ili rakontis pri siaj vilaĝoj,
pri verdaj montetoj kaj vento ĉe-mara.
Denove antaŭ la okuloj aperas la malnovaj domoj,
junaj edzinoj kiuj atendas ilin
kun la infano ne vidanta sian patron ekde jaroj.

La kun-trinkantoj ripetis tiun revon
tiomfoje, ke fine ili kredis
ke, ŝparinte sufiĉan monon,
ili revenas al siaj familiaj domoj.
Sed forgesis ke reale ili troviĝas
ĉi tie, en fremda urbo.

Rekantaĵo:

Jen greka vin' . . .

Ĉi tiu filmeto montras al vi etoson de la kanto, en la formo de karaokeo. En la taverno dum malvarma vespero renkotiĝas gastlaboristoj kaj vi povas kunkanti la rekantaĵon:

(4:07) <https://www.youtube.com/watch?v=xNYxW65R9o8>.



Tuŝante la dramon de gastlaboristoj, kiuj devis forlasi siajn landojn, familion kaj geamikojn por vivi eksterlande – la kanto de U. Jürgens "Greka vino" (Grechischer Wein) impresis multajn aŭskultantojn.

Aprezis tion la greka ĉefministro s-ro Konstantinos Karamanlis, kiu persone invitis la ambaŭ kun-aŭtorojn al Ateno kaj tie afable ilin gastigis.

La melodio mem havas simplan ritmon kaj estas facile dancebla:

<https://www.youtube.com/watch?v=xKoWnmAAVbk>

Oni ludas ĝin ankaŭ per diversaj instrumentoj:

Akordione – https://www.youtube.com/watch?v=KZ_twVPPXr4

Per trumpeto – <https://www.youtube.com/watch?v=iwK6jG8Wg9o>

Pajnoflute – https://www.youtube.com/watch?v=e7eEj-Hv_ec.



En sia junaĝo, Udo formis muzikan grupon en urbo Klagenfurt kaj lia kariero daŭris pli ol 50 jarojn. Sume, li komponis preskaŭ mil kantojn, multajn en stilo de francaj kanzonoj (*chanson-style*).

La kantoj de Udo Jürgens logis multegajn aŭskultantojn de ĉiu aĝo kaj entute ili vendiĝis en kvanto de ĉ. 100 milionoj.



Aŭstrio dediĉis poŝtmarkon al sia fama artisto.

La 1-an de januaro, en multaj landoj estis celebrata la 50a Monda Tago de Paco (MTP / World Day of Peace - WDP). Oni establis ĝin en decembro 1967, laŭ propono de franca filozofo, vojaĝanto kaj humanisto **Raul Follerau**.

Tiun ideon inspiris i.a. Johano 23a per sia encikliko "Pacem in terris" (*Pacon sur tero*) publikigita printempe 1963. Tiam la homaro troviĝis rande de atoma milito, pri kio vi legos en alia numero de "NU". Per tiu dokumento li apelacias ke ĉiuj homoj de bona volo - sendepende de personaj kredoj kaj vivkonceptoj - kunigu siajn fortojn por defendi pacon en la mondo.



La 50a Monda Tago de Paco



Supra foto: Monumento de Johano la 23a en pola urbo Wrocław, kie okazis la 19a Ekumena E-Kongreso.

La MTP-daton oni fiksas por la unua tago de jaro kaj ekde 1968 ĉiujare estas elektita aktuala temo, kiun oni disvastigas tutmonde. En la mesaĝo por 1968, oni legis ke: *"Tiu tago estu celebrata en la unua tago de januaro, kiu mezuras la ritmon de homa vivo en tempoj, kiuj esperigas ke la estontaj generacioj vivos en justa paco kaj harmonia progreso. Ni opinias, ke ĉi tiu propono esprimas la dezirojn de la nacioj kaj ties registaroj internaciaj porpacaj organizaĵoj religiaj, sociaj kaj kulturaj institucioj junularo kaj ĉiuj saĝaj homoj kiuj vidas kiel paco estas necesa kaj samtempe minacita. Estas do grave, ke al tiu iniciato aliĝu ĉiuj honestaj pacamikoj kiuj komprenas ke paco, kiel fundamenta bono, fruktos en belsona komuna koruso de la homaro"*.

Jen kelkaj temoj de la pasintaj jardekoj:

Beataj estas pac-konstruantoj (2013)
 Vero estas la forto de paco (1980)
 Se vi deziras pacon, laboru por justeco (1972)
 Ne ekzistas paco sen justeco (2002)
 Defendo de Homaj Rajtoj estas la vojo al paco (1969)
 Respekto al ĉies konscienco estas la kondiĉo por paco (1991)
 Libereco religia estas la kondiĉo por paca kunekzistado (1988)
 Familio estas la pac-fonto por la homaro (1994 - Internacia Jaro de Familio)
 Ni sekurigu pacan estontecon por la infanoj (1996)
 Paco kaj junularo iras kune (1985 – Internacia Jaro de Junularo)
 Ni atingos pacon per pac-edukado (1979)
 Tasko ĉiam aktuala: edukadi por paco (2004)

Paco estas tia valoro, kiu ne rekonas dividojn (1986 – Internacia Jaro de Paco).

Dekstre: Emblemo por jaro 1986, eldonita de MEM (Mond-paca Esperanata Movado) >>



Dialogo inter kulturoj estas la vojo al civilizo de frateco kaj paco (2001)
 Se vi volas kultivi pacon, protektu la kreitaĵojn /la naturon (2010)
 Se vi deziras pacon, proksimiĝu al malriĉuloj (1993)
 Superante indiferecon, vi konstruos pacon (2016).

Temo, kiun papo Francisko elektis por la kuranta jaro: Politiko porpaca - malakceptu perforton.

Ĉi tie vi povas legi parton de tiu mesaĝo: *La pasintan jarcenton dezertigis la du teruraj mondmilitoj, la homaron minacis atoma milito kaj multaj aliaj konfliktoj. Bedaŭrinde, ankaŭ nuntempe ni vidas globan militon je fragmentoj, kiuj kaŭzas doloregojn inter la viktimoj kaj ruinigas naturan medion en landoj atakitaj de fremdaj armeoj. La organizita teroro kaŭzas tragedion de milionaj rifuĝintoj. (...) Uzante perforton en konfliktoj, ni neniam atingos pacon. En dankema memoro de la popoloj, por ĉiam restos atingiĝoj de Mahatmo **Gandhi** kaj Abdul Ghaffar **Khan** en liberiĝo de Hindujo aŭ Martin Luther **King** en kampanjo kontraŭ rasa apartigo. En neperforta luktado por paco, precipe valoraj povas esti virinoj, kies ekzemplo estas Leymah **Gbowee** kaj miloj de aliaj virinoj en Liberio. Per organizado de preĝaj renkontiĝoj kaj porpacaj protestoj, ili sukcesis gvidi al altnivelaj negocoj kiuj fine finis longdaŭran civilan militon en tiu afrika lando. (...) Estas tre grave, ke en niaj familioj kaj inter proksimaj najbaroj regu atmosfero de paco kaj amikeco. El ama koro de la familio radias ĝojo al tuta socio. La universala etiko de frateco kaj paca kunekzistado inter la najbaroj kaj popoloj ne povas sin apogi je logiko de timo, perforto kaj izoligo. Kontraŭe: tia fundamento povas esti nur reciproka estimo, respondeco kaj sincera dialogo.*

Por ke ĉiuj estu unu

Inter la 18a kaj 25a de januaro, oni celebras ĉiujare la Semajnon de Preĝoj por Unueco de Kristanoj - SPUK, (angle - *Week of Prayer for Christian Unity*; france - *Semaine de prière pour l'unité chrétienne*; ruse - *Неделя молитв о единстве христиан*; hispane - *Semana de oración por la unidad de los cristianos*; germane - *Woche des Gebets für die Einheit der Christen*). Dum tiu semajno, en la tuta mondo okazas multaj konferencoj, renkontiĝoj kaj Diservoj kiujn organizas Ekumenajn Komisionojn en diversaj landoj.



La tradicio komenciĝis komence de la pasinta jarcento, antaŭ la unua mondmilito. Publikigita post kvindek jaroj (en 1964) dekreto *Unitatis redintegratio* (Restarigo de unueco) substrekas la neceson preĝi tiucele ĉar "realigo de ĝi superas homajn fortojn". Post la dua mondmilito, la iniciaton aprobis Monda Konsilio de Eklezioj – MKE (angle: *World Council of Churches* / france: *Conseil œcuménique des Églises* / germane: *Ökumenische Rat der Kirchen*). MKE fondiĝis en jaro 1948 en Amsterdamo kaj sian sidejon ĝi havas en Ĝenevo. Ĉe la komenco apartenis al ĝi jenaj eklezioj: anglikana, baptista, luterana, reformita, metodista kaj unita. Nuntempe, al MKE membriĝis ĉ. 350 eklezioj en 120 landoj.

En jaro 1968, por la Semajno oni uzis materialojn, kiuj estis ellaboritaj kun la Ponifika Konsilio por Antaŭenigi Unuecon inter Kristanoj (latine: *Pontificium Consilium ad Unitatem Christianorum Fovendam* – PCUCF; angle: *Pontifical Council for Promoting Christian Unity*; france: *Conseil pontifical pour la promotion de l'unité des chrétiens*), kiu reprezentas ĉiujn katolikojn en la mondo. Kunlaboro inter tiuj du ĉeforganizaĵoj kreskis jaron post jaro kaj en 2008 (centjariĝo de la Ekumena Movado) kaj rezultis per komune eldonita publikaĵo.

La tempestan dekadon de la "dolĉaj" 1960aj jaroj (konataj kiel "sweet sixties" kun amasaj ribeloj de junularo, protest-kantoj, drog-uzado kaj fascino pri orientaj filozofioj) markis ankaŭ la komenco de fratecaj kontaktoj inter la katolika kaj ortodoksa eklezioj, kiujn reprezentas la **Ekumena Patriarko de Konstantinopolo** (greke: Οικουμενικός Πατριάρχης) en Istanbul. Entute, al ortodoksaj eklezioj apartenas ĉ. 250 milionoj da kristanoj. La amikeca dialogo komenciĝis en januaro 1964, kiam papo Paŭlo la 6a renkontiĝis kun ĉefepiskopo Atenagoras.

Poste sekvis pli oftaj kontaktoj inter Johano Paŭlo la 2a kaj ĉefepiskopo Demetrio. Ekde jaro 1991, en la sidejo de ekumenaj patriarkoj laboras aktuala ĉefepiskopo de Konstantinopolo, **Bartolomeo** kiu naskiĝis en vilaĝo Zeytinli, sur greka insulo Imbros, hodiaŭ – parto de Turkio.

(En jaro 1922, la insulon invadis turka armeo kaj baldaŭ komenciĝis brutala persekutado de la grekoj kiuj konsistigis tiam preskaŭ 100% de la tuta loĝantaro. Hodiaŭ en Imbros vivas nur ĉ. 200 grekoj.)



Dum sia junaĝo, Bartolomeo studis en universitatoj de Svislando, Italio kaj Germanio kaj doktoriĝis pri juro. Bartolomeo la 1-a estas poligloto kiu, krom la greka kaj turka lingvoj, li flue parolas en latina, klasika greka, franca, itala, angla kaj la germana. Post instaligo en la posteno de Ekumena Patriarko, Bartolomeo komencis aktivi en inter-religia dialogo kaj ligis multajn kontaktojn kun katolika Eklezio kaj islamo. Pro sia porpaca kaj porunueca laboro, en oktobro 2015 li ricevis la *honora doktorecon* ĉe Sophia Universitato.



Antaŭ du jaroj, oni petis unu el kristanaj grupoj en Germanio ke ili preparu materialojn por la ĉijara Semajno, okaze de la 500a datreveno de la Protestanta Reformacio. Ĝuste tiam, antaŭ kvin jarcentoj, komenciĝis la disŝira dramo de okcidenta kristanismo. Por plua forigo de la muroj kiuj ankoraŭ dividas la kristanojn, la grupo elektis la vortojn: "Amo de Kristo imperativas je ni". La pasinta duon-jarmilo ne estas nur la historio de konfliktoj, sed ankaŭ la 50-jara komuna proksimiĝado al unueco. En lastjara februaro, papo Francisko renkontiĝis kun la rusa ortodoksa **patriarko Kiril** kaj du monatojn poste kun la Ekumena Patriarko Bartolomeo de Konstantinopolo kaj ili ambaŭ vizitis la tendarojn por rifuĝintoj en Grekio.

Papo Francisko montris bonvolon en lasta oktobro, kiam li veturis al Svedio. Tie oni ĵus komencis preparojn por tiu 500jara jubileo kaj li partoprenis la ekumenajn preĝojn kun svedaj luteranoj. Sur la supra foto videblas papo Francisko dum la vizito en Svedio, kie li renkontiĝis kun **M. Junge**, ĝenerala sekretario de Monda Luterana Federacio kaj kun ep. A. Jackelen.

Komence de la sama monato, Francisko renkontis anglikanan ĉefekispokon **Justin Welby** de Canterbury; la eventon partoprenis ankaŭ aliaj anglikanaj episkopoj. Kiel *signo de la tempoj*, funkcias la t.n. "ekumenismo de la popoloj" (dialogo inter simplaj homoj) en kiu Esperanto povas ludi gravan rolon. Sed, por ne trovastigi la temon, ni publikigos pri tio apartan artikolon.



Sur monda skalo, pli kaj pli urĝas dialogo inter la plej grandaj religioj, al kiuj apartenas plimulto de la homaro:

Religio	Nombro de kredantoj	Elcento
Kristanismo	2.3 miliardoj	32 %
Islamo	1.5 mld	22 %
Hinduismo	1 mld	14 %
Tradiciaj religioj de Ĉinio	ĉ. 400 milionoj	5.50%
Budhismo	400 mlnj	5.30%
Etnaj religioj*	300 mlnj	4.20%
Afrikaj tradiciaj religioj	100 mlnj	1.40%
Ceteraj religioj		ĉ. 2.00 %
Entute, de la globa loĝantaro		= ĉ. 84 %

* Rilate al etnaj religioj, ni povas paroli pri: amerikaj indianoj kaj eskimoj (de Nordameriko), aborigenoj en Aŭstralio, maorioj de Novzelando, indiĝenaj loĝantoj sur insuloj de Pacifika Oceano ktp. Por sekurigi pacan vivon en la futuro, oni devas ankaŭ eniri dialogon kun homoj nereligiaj, agnostikoj kaj ateistoj kiuj nombras pli ol unu miliardo (ĉ. 16%) kaj entute sumiĝas al 97 elcentoj de la homaro. Kunlaboro kun tiuj homoj povas okazi surbaze de kulturo, sporto ktp.

*

Ĉiujn honestajn homojn tre maltrankviligas la situacio de kristanoj en Okcidenta Azio (t.n. "Mezoriento") precipe en la martira urbo de **Aleppo**, en kies orienta parto pli ol 20,000 mortis pro sangaj persekutoj flanke de la armitaj ribelantoj kiu pafis ankaŭ al tiuj dekmiloj, kiuj volis fuĝi. Kiam la urbo estis liberigita, unuafoje post kvar jaroj oni povis celebri tie la Kristnaskan Feston. Denove funkcias la sistemo de akvotuboj sed kiel vivi inter la ruinoj?



Unuafoje post kvar jaroj, la loĝantoj de Aleppo povis celebri Kristnaskan Feston sekure. Dum la civila milito, en tiu urbo (iam ekonomia centrejo de Sirio) regis sanga teroro kaj multaj kvartaloj estas ŝanĝitaj je ruinoj. En la morta minaco, pafado, forkaptoj kaj ĉiuspeca krueleco de la milito, la Aleppanoj volis forgesi pri morto kaj frosto, eĉ en unu vespero. Kun partopreno de koruso Naregatsi, p. Elias Janji organizis koncerton en la preĝejo. En la plenigita "koncertejo" la ĉeestantoj povis aŭdi muzikajn majstroverkojn de Verdi, Mozart, Vivaldi kaj Karl Orf.

Tiutempe okazis bombardado de raketoj, kiujn pafis la ribelantoj el orienta kvartalo, mortigante sendefendajn homojn aŭ eĉ infanojn en lernejo. La homoj estas jam tre lacaj kaj deziras, ke tiu konflikto finiĝu, sed la armitaj grupoj ne volas kapitulaci. Ili pafas plu, malgraŭ alvokoj de la oficiale sendita UN-delegito, s-ro S. De Mistura kiu postulis ke ĉiuj armitoj lasu la urbon por ke aliaj senkulpaj homoj ne mortu. Multaj volis fuĝi al okcidenta Aleppo, sed tiam la ribelantoj pafis kontraŭ ili. Tamen la koncerto – apenaŭ dum tiu sola vespero – helpis al aŭskultantoj levi alte iliajn animojn kaj antaŭĝui liberecon, kiu fine devos alveni.

La Torĉo



En ĵus pasinta januaro, la tre laŭta boksisto Muhammad Ali celebrus sian 75-an naskiĝdaton. Sed li ne ĝisvivis tiun jubileon, ĉar mortis en lastjara junio. Cassius Marcellus Clay (tia estas lia originala nomo) naskiĝis en usona mezorienta ŝtato Kentucky (eo: *Kentukio*) kaj komencis praktiki bokson jam kiel 12-jara infano.

La bunta vivo de Ali

Verŝajne oni trovis en Cassius nekutiman talenton, ĉar sendis la 18-jaran knabon al 17-aj Olimpikaj Ludoj en Romo. Tie la debutanta junulo iris ŝtorme al finala lukto kaj venkis laŭvice la reprezentantojn de: Belgio, Sovetunio kaj Aŭstralio.



Sed en lasta lukto li renkontis polon Zbigniew Pietrzykowski, kiu ankaŭ kandidatiĝis al ormedalo kaj en antaŭaj tagoj venkis facile kvar boksitojn el: Aŭstralio, Okcidenta Germanio (BRD/FRG), Bulgario kaj Italio.

La 26-jara **Pietrzykowski** estis tiutempe unu el plej bonaj boksistoj en Eŭropo kaj dum la du unuaj partoj (ang: *boxing rounds*) de la finalo, ambaŭ sportistoj ŝajnis batali egalŝance. Tamen, post jaroj Pietrzykowski konfesis ke tio estis la tre laciga lukto: Clay havis nekredblan instinkton pri la distanco kaj kiam "Pietrzyk" (tiel nomis lin klubaj kolegoj) ŝajne trafis lian maksilon kaj la publiko aplaudis, tiumomente Cassius nerimarkeble malproksimis, nur je kelkaj centimetroj. La tria parto jam apartenis al juneco. La freŝa 18-jarulo altrudis grandan rapidecon kaj tio elĉerpigis la energion de Pietrzykowski. Cassius Clay estis ne nur pli juna, sed 10 centrimetrojn pli alta kaj havis longegajn manojn. Rezulte, Pietrzykowski atingis "nur" arĝentan medalon.

Zbigniew Pietrzykowski atingis sume 3 olimpikajn medalojn (Melbourne-1956, Romo-1960, Tokio-1964) kaj estis kvarfoja ĉampiono de Eŭropo. Entute li partoprenis 350 pugnobatalojn, inter kiuj malvenkis nur 14-foje (dufoje estis remiso). Do venki tiel meritan boksiston estis la grandega sukceso por Cassius. Ni aldonu, ke dum la sama ĉampionado, la du ceterajn (bronzajn medalojn en tiu kategorio) akiris italo G.Saraudi kaj aŭstraliano A.Madigan.



18-jarulo kun sia medalo fieras en Romo

Tio estis la unua kaj sola Olimpiko, en kiu Clay partoprenis. Nur du monatojn post la reveno al Usono, li komencis boksi kiel profesiulo. En jaro 1964 Clay venkis Sonny Liston, fariĝis unuafoje profesia mondĉampiono kaj ŝanĝis sian nomon je *Cassius X*.

Tiutempe, en tuta Usono stormis amasaj protestoj kontraŭ la rasa apartigismo. Cassius mem rememoris kolere la tagon, kiam - liaopinie pro la haŭtkoloro - oni rifuzis al li drinki akvon en vendejo. Tiam li konvertiĝis al islamo kaj denove ŝanĝis la nomon je *Muhammad Ali* (Ali ibn Abi Talib estas la dua plej granda figuro en ŝija branĉo de islamo).

Printempe 1966, Muhammad rifuzis servi en la usona armeo kaj klarigis ke tio estas lia protesto kontraŭ la milito de Usono en Vietnamjo. Tiam oni nuligis lian titolon de "mondĉampiono" kaj kaj retenis la licencon por boksado en Usono. Ali do veturis al Kanado, sekve al Eŭropo kaj ankaŭ tie sukcesis.

Tamen la senboksa paŭzo en Usono estis tre longa kaj daŭris pli ol 30 monatojn (ekde marto 1967 ĝis oktobro 1970). Tiel malfermiĝis nova ĉapitro en la vivo de Ali. Komence li venkis frue unu batalon, sed la sekva ne estis tiel facila.

La dua kontraŭulo, **Joe Frazier** estis ankoraŭ neniam venkita. Oni anoncis ke tiu matĉo de la jarcento okazos en marto 1971. Muhammad Ali, kiel kutime, kondukis arogante kaj antaŭ la batalo kelkfoje ofendis Frazier per laŭtaj kaj tre malĝentilaj epitetoj. Sed la krioj ne sufiĉis kaj tiutage Ali malvenkis, unuafoje en sia kariero.



La granda triopo: Frazier, Foreman kaj Ali

Tri jarojn poste, okazis "batalo de la jarcento" - kontraŭ **George Foreman**, fortega kvazaŭ bizono. George estis sep jarojn pli juna ol Muhammad kaj en la antaŭaj 40 bataloj neniu lin venkis. Foreman superis la tutan tempon kaj multaj pensis ke Ali havas neniun ŝancon por venki. Ali multfoje staris en la boks-arena angulo kaj ricevadis terurajn batojn. Sed li taktike atendis ĝis la 8-a parto (rundo? /angle: *boxing round*) kaj kaptis la momenton en kiu Foreman senzorge sin malkovris. Tiam Ali rapide "pafis" la serion de pugnofrapoj kaj, por ĉies surprizo, finis tiun batalon per nokaŭto. En sia lasta jardeko Ali malvenkis kvarfoje, inkluzive la adiaŭan matĉon en decembro 1981.


Kion diri pri la stilo de lia boksado? Certe li bonege uzis la piedojn kaj - "dancante" ĉirkaŭ la boksareno - iĝis tre malfacila por trafo. Post jaroj li rememoras: *'Mi dancis kiel papilio kaj pikis kiel abelo'*... Montras tion la filmeto: <https://www.youtube.com/watch?v=kX5vjty1SV0>. Sed li tiel tro riskis provokante la kontraŭulojn per ofta tenado de la manoj malsupre. Kompreneble, tiam li ne povis protekti la kapon. Pro tia neglektemo, lia kapo dum jaroj estis frapita kelkcent-foje (kvankam tio estis evitebla). Se ni scias, ke la pugnobaton de profesia boksisto oni povas kompari kun ĉevalhufa frapo, tiam neniun surprizas la novaĵo ke tiu aŭ alia boksisto falis surplanke, perdis konscion kaj oni devis urĝe voki kuraciston.



Ankaŭ Ali pagis la grandegan prezon kaj en jaro 1984 li eksuferis de Parkinsona malsano. Tiu tragedio lin ŝanĝis komplete: la iam bombasta kriaĉulo povis nun moviĝi tre malrapide kaj parolis kun peno.

Kiam oni elektis Ali por flamigi la olimpikan kaldronon dum "Atlanto 1996" – la ŝokita publiko ekvidis nur ombbron de la iama ĉampiono.

< Maldekstre: Joe Frazier estis la nura boksisto, kiu nokaŭtis Ali.



La malsano progresis kaj la eksa ĉampiono konstante tremis, apenaŭ kapabla teni la torĉon. En 2011, oni filmis lin dum la funebra ceremonio de Joe Frazier (kun kiu Ali antaŭe konkordis kaj amikiĝis). Muhammad Ali ne povis memstare iri kaj oni devis lin helpi por eniri aŭtomobilon.

Kiel firmiĝis la nomo de Ali en la sporta historio? Pinte de sia kariero, li kondukis infanece. Konataj estis liaj krioj: "Mi estas la plej bona!" (*I'm the best! I'm the best!*). Antaŭ ĉiu matĉo, Ali ŝatis deprimi sian kontraŭulon per ofendaj krioj. Tio plaĉis al tiaj ĵurnalistoj kiuj per skandaloj volis "ornami" siajn artikolojn aŭ televidajn programojn.

Do gazetaro kaj televido komencis ofte publikigi materialojn pri tiu megalomania boksisto. Tia bufonado fariĝis ankaŭ forta reklamo por la sporto mem. Eble lia bunta personeco kaŭzis, ke Muhammad Ali estis elektita la plej "elstara boksisto en la peza kategorio"?




Ne ĉiuj pri tio konsentas. Laŭ statistiko, almenaŭ dek boksistoj de lia kategorio atingis pli bonajn rezultojn. Absoluta rekordo apartenas al **Lee Savold**, mondĉampiono en jaroj 1950-1951: li venkis 90-foje en 137 matĉoj.

Boksisto, kiu plej longe tenis la mondan ĉampionecon (dekdu jaroj inter 1937-1949) estis **Joe Louis**.

Ekde jaro 1952, plimulto de la profesiaj ĉampionoj unue atingis orajn medalojn dum Olimpikaj Ludoj. La senprecedenca evento okazis dum la olimpiko "Montrealo-1976" kie la du **Spinks-fratoj** venkis medalojn: Leon (oran) kaj Michael (arĝentan). Cetere, post jaroj ili ambaŭ fariĝis ĉampionoj ankaŭ en profesia boksado. Kio ajn diri, neniu el boksistoj atingis tian polularecon kiel Ali.




Li demonstris groteskan humoron ĉe diversaj okazoj, kio plaĉis al kreskanta nombro de la homoj kiuj rigardis lin simpatie. Fariĝinte persono plej rekonebla, Ali estis ofte invitata al publikaj eventoj kiel ekz. intervjuo, karitata kampanjo, televidaj programo ktp.



Sur la dekstra foto: M. Ali kun Martin Luther King (1929-1968) – baptista pastoro kaj unu el ĉefgvidantoj de la neperforta movado por civilrajtoj en Usono. Pro tio, M.King ricevis Pacan Nobel-premion sed post kelkaj jaroj li estis pafmortigita en hotelo.

Antaŭ la 1960aj jaroj, ĉio aspektis ĝusta kaj simpla ĉar ekzistis nur unu aŭtoritata institucio kiu okupiĝis pri la mondaj ĉampionecoj. Sed post la dua mondmilito okazis en Usono disputoj inter la diversaj organizantoj kaj oni ne povis interkonsenti kiu esta pli grava. Tiel kreiĝis kelkaj organizaĵoj kiuj sendepende komencis reklami multekostajn matĉojn kaj uzurpis disdonadon de titoloj pri la ĉampionumo. Rezulte, okazis multfoje tia absurdaĵo, ke en la sama periodo oni deklaris kelkajn "mondajn ĉampionojn" – rigardu la asterikojn*. La suba tabelo montras la plej sukcesintajn boksistojn en lastaj jardekoj de la pasinta jarcento (temas nur pri la pezega kategorio).

Nomo, naskiĝjaro	Atingitaj oraj medaloj dum Olimpikaj Ludoj	Ĉampioneco en profesia boksado	Nombro de matĉoj / venkoj	Rimarkoj
Rocky Marciano, 1923	–	1952-1956	49 /49	Neniu lin venkis
Floyd Patterson, 1935	Helsinki, 1952	1956-1959	64 /55	
Muhammad Ali, 1942 (originala nomo: Cassius Clay)	Romo, 1960	1964-1967 kaj 1974-1978	61 /56	Laŭte komedia
Joe Frazier, 1944	Tokio, 1964	1968-1973	37 /32	
George Foreman, 1949	Meksiko, 1968	1973-1974 kaj 1994-1995	81 /76	Escepto: li vivas sukcese post boksado
.....
Larry Holmes, 1949	–	1983-1985	75 /69	
Mike Tyson, 1966	–	1986-1990* kaj 1996-1999*	58 /50	Fifamis pro brutaleco
Evander Holyfield, 1962	Los Angeles, 1984 (bronza)	1990-1992 kaj 1996-1999*	57 /44	
Lennox Lewis, 1966	Seul, 1988	1992-1994 kaj 1997-2004*	44 /41	



*Ankaŭ
ĉampiono
devas
foje
malvenki ...*



Nia Vilaĝo

Homo kaj naturo



Heroldo printempa:

Neĝborulo (*Galanthus nivalis* L)

Per sia fleksibleco, Esperanto donas preskaŭ senlimajn eblecojn krei novajn vortojn. Kaj tion oni faras ankaŭ kun biologiaj nomoj. Bona ekzemplo estas la prezentita nun planto, kiu ĝojigas la okulojn antaŭ ol vintra neĝo degelos. Kalendaro de la naturo vekas frue la neĝborulon, kies tigoj komencas kreski sub la neĝo. Kiam tagoj fariĝas varmaj kaj pli longaj, sur la neĝtavolo aperas la tri-petalaj, blankaj floretoj kaj anoncas ke printempo jam proksimas. Neĝborulo apartenas al familio de *Amarilidacoj*; ĝi popularas en arbaroj de Meza kaj Suda Eŭropo.



La planto kreskas ĝis 25 cm de alteco, ofte en grupoj. Traborinte la neĝtavolon, ili formas impresan tapiŝon.

Pro tiel simpatiaj ecoj, la nomo de neĝborulo ripetiĝas en diversaj lingvoj kun la motivo de neĝo, vintro aŭ sonorileto (al kies formo similas ĝiaj blankaj floretoj).

Vi povas tion kompari en kelkaj lingvofamilioj.

Lingvoj latinidaj: france (*Perce-neige*), hispane (*campanilla de invierno* /galanto), katalune (*Campaneta d'hivern*).

En **slavaj lingvoj** oni ofte nomas tiun planton "sub-neĝulo":

Ĉeĥe (*Sněženka podsněžník*), slovake (*Snežienka jarná*), pole (*Przebiśnieg*), kaŝube (*Pòdsnieżk*), sorabe (malsupra Sorabujo: *Mała sněgulka* / supra Sorabujo: *Mała sněhowka*), ruse (*Подснежник белоснежный* – Pòdsneĵnik belosneĵni) belaruse (*Пралеска беласнежны* – Praleska belasneĵni), ukraine (*Підсніжник звичайний* – pidsnihnik zviĉajni), bulgare (*Обикновеното кокиче* – Obiknovenoto kokiĉe), serbo-kroate (*Bucibaba* /*Visibaba*), slovene (*Navadni mali zvonček*).

Simile ĝi sonas en lingvo litova: (*Baltoji snieguolė*).

Dekstre: Neĝboruloj en blazono de vilaĝo Dobříň (okcidenta parto de Ĉeĥa Respubliko) >



Saksogeremanaj lingvoj: angle (*Snowdrop*), dane (*Almindelig Vintergæk*), germane (*Kleine Schneeglöckchen*), nederlande (*Gewoon sneeuwkllokje*), norvege (*Snøklukke*), svede (*Snödroppen*).

Ugrofinnaj linvoj: hungare (*Kikeleti hóvirág* - Eliranta floreto), finne (*Puistolumikello* -parka neĝa sonorileto), estone (*Harilik lumikelluke*).

En la regiono daŭre minacata per senarbarigo, Raimundo kun Edilene kaj aliaj familioj sukcesis en sia loĝloko aranĝi neturrezervejon kie biodiversity estos protektita. Raimundo estas frizisto, dum lia edzino – anesteziologo kaj oficisto de la ŝtata administracio. Tio signifas, ke ili ne estas profesiuloj pri medioprotektado. Sed kiam tiun regionon invadis firmaoj fremdaj kulture, pretaj brutale ekspluati kaj detrui la naturmedion, tiam lokaj loĝantoj serioze sin demandis: Kian natur-heredaĵon ni postlasos al niaj infanoj? Kiel ni diskonigu nian vidpunkton al socio kiu ŝajnas nekonscii pri la danĝero? Ĉu ni povos iri kontraŭ la potenca fluo?

Naturamikoj kun larĝa koro

Amazonio estas fakte la makroregiono (regionego), en kiu ĉio estas granda – fronte kun ĝia spaco (ĉ. 50% de la tuta Brazilo). Pro siaj biodiverseco, arbaroj kaj volulmeno de nesalaj akvoj, Amazonio estas prave nomita la "verda pulmo de la Tero". Sed, pro la amasa senarbarigo, ĉiuj valoraj riĉaĵoj de la naturo povas perdi komplete sian netakseblan efikecon.



Spite al ĉio, esperigas nin la naturamikoj kiuj persistas vivi en Amazona Arbarego kaj protekti ĝian medion. Raimundo edziĝis kun Edilene antaŭ 29 jaroj; nun ili havas tri infanojn kaj tri nepojn. La familio vivas en nord-brazila regiono de Abaetetuba. Dum la 1980-aj jaroj, en ties tri urbetoj – Igarapé-Miri, Moju kaj Barcarena – lokiĝis famaj industriaj centroj kaj min-setlejoj. Multaj familioj forlasis siajn vilaĝojn por labori en trans-naciaj fabrikoj. Kun la espero plibonigi sian vivon, ili ekloĝis en la ĉirkaŭaj antaŭurboj. Riĉecon la novaj loĝantoj neniam atingis, do iliaj revoj kaj ĉiuj planoj montriĝis iluzio. Kaj alveno de la novuloj nur pligrandigis la jam ekzistantan tie mizeron. Post nelonga tempo, ĉiuj rimarkis ke la industrio ruinige influas lokan medion.

Unue komencis nerimarkeble malaperi "açazeiros" (palmarbo *asaio* - *Euterpe oleracea*), kiujn oni uzis por ekstrakti palmomedolon. Tiumaniere, loĝantaj tie familioj estis senigitaj de la tre grava nutraĵo, ĉar fruktoj de tiu arbo altigas homan energinivelon, forigas toksojn, helpas dormon, reduktas kolesterolon ktp.

Krome, la industrie neuzitaj restaĵoj estis forĵetitaj en la riverojn kio draste reduktis nombron de la fiŝoj kaj salikokoj (scienca nomo: *caridea*). Ankaŭ, pro la poluita aero, lokaj plantoj ne plu fruktis kiel antaŭe.



Simile okazis je la regiona skalo. Sed la senarbarigo en tiom vasta spaco havos tre negativajn konsekvencojn ankaŭ je globa nivelo. Ne estis kuraĝige vidi kio devas esti farita. Sed Raimundo kaj Edilene kredis, ke unueco inter la familioj kaj fido je Dia providenco povos ŝanĝi tiun situacion. Leginte lastan enciklikon "Laudato Si" (*Estu laŭdata, Sinjoro*), ili trovis la defion ke ĉiuj homoj de bona volo devus zorgi pri la naturo, ĉar la Tero estas nia komuna domo. Tio ilin inspiris fari ion gravan en la vivo kaj sekve ili decidis transformi la 34-hektaran paŝtejon je frukta bosko.

Tiucele oni elektis la indiĝenajn por tiu regiono plantojn, kiuj espereble kreskos firmaj kaj rezistos formorton. Bedaŭrinde, kelkaj arboj (kiujn ili memoras el sia junaĝo) jam ne plu kreskis tie. Tio ne senkuraĝigis la entuziasmulojn kiuj energie laboris por restarigi la naturan biodiversecon.

Hodiaŭ ilia bosko produktas 166 fruktospecojn. Ĝi ne nur plibonigas signife materian staton de la vilaĝo, sed ankaŭ montris alternativon por la daŭripova estonteco de la regiono. Pro sia aktivado, la organizantoj ricevis diversajn premiojn, inklude tiun de Goeldi Parà Muzeo en Belém.



La geedza paro nomis tiun lokon Radini, uzinte la nomojn de siaj tri infanoj: Raisa, Radi kaj Raoni.


Vizitas ĝin ofte sciencistoj, natur-amikoj, socigvidantoj, artistoj, ordinaraj homoj kaj (precipe!) junularo. Surloke ili ĉiuj povas partopreni lecionojn pri natur-protektado, biodiverseco kaj ricevi taŭgajn informilojn.

Fojfoje la regionaj gazetoj kaj magazinoj publikigas artikolojn pri Radini. Rezulte, okazas diversaj vizitoj kaj Edilene kun Raimundo estas surprizitaj ke multaj homoj interesiĝas pri ilia vivo. Kelkaj eĉ volas sekvi ilian ekzemplon kaj fariĝi ankaŭ la natur-protektantoj "kun larĝa koro".

* * *

Pereita en ĝangalo

Ni prilaboris la tekston aldone al tiu ĉi supra, pri la amazonaj naturamikoj



Antaŭ sepdek jaroj, juna franca ĵurnalisto trairis la brazilan ŝtaton Mato Grosso, kiu najbaras al suda Amazonio. Raymond /Rajmond Maufrais trairis 1800-kilometrojn tra la "pampas" (brazila prerio) kaj flotis 900 kilometrojn sur riveroj. Atakita de la indiĝenaj popoloj, li devis ĉesi tiun aventuron. Tio ne senkuraĝigis la riskeman vojaĝanton kaj tri jarojn poste li eniris la sekvan, multe pli danĝeran veturadon tra alia parto de la sudamerika tropika ĝangalo. Tiel komenciĝis la dramo kiu ŝokis la mondon kaj kies epilogo ĝis hodiaŭ restas mistera.

Pri liaj vojaĝoj aperis du libroj: "Aventures au Mato-Grosso" (*Aventuroj en Matto-Grosso*) kaj "Aventures au Guyane" (*Aventuroj en Gviano*), tradukital al diversaj lingvoj. Tiu dua libro estis eldonita jam post lia morto, surbaze de la taglibro, kiun Maufrais lasis en lastaj semajnoj de sia tragedia vojaĝo.

Maufrais naskiĝis antaŭ 90 jaroj en sudfranca havenurbo **Toulon** kaj malaperis en Gujana ĝangalo, verŝajne en februaro 1950. Serĉante ekscitan materialon por gazetaj reportaĵoj, la 23-jara Rajmond flugis al Franca Gujano (Gviano) kaj fine de la jaro 1949 li komencis solecan aventuron kun la celo trairi **Tumuc-Humac** montaron. Li esperis renkonti tie nekonatajn indian-tribojn.

La montara sistemo de Tumuc-Humac (portugale: *Serra do Tumucumaque*, france: *Monts Tumuc Humac*) formas la naturan 120-kilometran landlimon inter Franca Gviano, Brazilo kaj Surinamo (Nederlanda Gujano) kiu estis tiam ne-trairebla sovaĝejo. Nuntempe oni scias, ke la juna esploristo ne havis ŝancon travivi ĉar ne estis preparita por tiel danĝera kaj longa marŝo. Post kelkaj semajnoj de soleca vagado, Rajmond ekvidis ke plua vagado tra la densa ĝangalo montriĝas neimageble malfacila kaj minacas lian vivon. Li renkontis tiam indianojn kaj kun ilia helpo li povis reveni al pli sekura regiono. Tio estis lia lasta ŝanco, sed Rajmond decidis riski plu.

En vilaĝo Grigel, iu donis al Maufrais malnovan boaton kiu baldaŭ montriĝis neuzebla. Ne havante monon por aĉeti provianton, li denove eniris la densan arbaregon. Raymond daŭrigis la vivoriskan marŝon kun sia hundo kaj dorsosako, esperante ĉasi iun animalon por manĝo. De tempo al tempo Raymond perdis orientiĝon kaj revenis al sama loko kiun li lasis en la antaŭa tago. Ofte li povis trairi nur po 2-3 kilometroj unutage. Vagante tra tiu malamika ĝangalo, Raymond - eĉ kiam malsata - skribis regule sian taglibron. Tie oni legis pri la dramo kiun li al si mem elektis.

Malsukcesinte batali kontraŭ la senkompata naturo (varmega kaj humida klimato, pikil-mordaj insektoj ktp.) li ne povis eĉ pafĉasi kaj pro malsato estis devigita manĝi trovitajn semojn, limakojn, kaj lacertojn. Tio rezultis je stomakdoloroj kaj disenterio sed, ne trovinte sekuran ripozlokon, li decidis iri plu. Ekstreme laca kaj malsana, Raymond atingis la bordon de rivero Tamouri. Tie li trovis la setlejon Claude, kies ĉiuj konstruaĵoj estis jam forlasitaj. Estis la 1-a tago de januaro 1950 kaj la mondo celebris novjaran feston. Nun la delira Maufrais devis akcepti la realon ke la planita celo ne atingeblas.

Rezigne, li serĉis alian ŝancon kaj provis konstrui floson. Tiumaniere, post 70-kilomera surrivera flosado, li volis atingi kreolan vilaĝon de Bienvenue. Ankaŭ tio fiaskis, ĉar la flosa disfalis en rapidfluo.



Do, la malfeliĉulo ekvadis laŭ riverbordo. Poste oni konjektis ke malsana kaj elĉerpita Maufrais ne povis trairi pli ol kelkdek kilometrojn kaj eble li fordronis en rapidfluejo rivera. Tiel oni klarigas la fakton, ke neniu povis trovi lian korpon.

La 13an de januaro 1950, en disfalanta kabano Maufrais forlasis sakon kun siaj fotilo kaj taglibro, kio estis unusola spuro de lia vojaĝo.

Li kunprenis nur malgrandan sakon kun kelkaj necesajoj kaj maĉeton por tranĉi lianojn, necesaj por pluri tra tiu verda densaĵo. Post kelkaj semajnoj, indiano de la Emerion-tribo veturis sur ĝangala rivero Tampok kaj en la apudrivera kabano trovis la posedaĵojn de Maufrais. Inter ili estis la taglibro, kun lasta enskribo kiun Raymond faris la 13-an de januaro 1950:

"Ĝis baldaŭa renkontiĝo, miaj amataj gepatroj! Necesas esperi. Mi lasas ĉi tie mian taglibron kaj kunprenas nur malgrandan notujon... Ĉi tiu forlasita taglibro estas la via. Skribante en ĝi, mi pensis pri vi ĉiuj kaj baldaŭ mi enmanigos tion al vi. Mi ĵuris al vi ke mi revenos kaj tiel fariĝos, se Dio permesos."

Pri lia malapero, la regiona gazeto reportis julie 1950 ke "Raymond Maufrais maleperis en la ĝangalo kaj oni malsukcese finis serĉadon de lia korpo". Lia patro, Edgar Maufrais en jaro 1952 forlasis la familion kaj forveturis el Francio por trovi Raymond. Edgar Maufrais traveturis 12,000 kilometrojn en la regiono kie Raymond malaperis kaj fine akceptis la fakton ke neniam plu ekvidos sian filon, ĉar li verŝajne jam ne vivas. Tiun malesperan periodon de sia vivo li poste priskribis en libro "Serĉante mian filon" (*À la recherche de mon fils*).

Pasis naŭ jaroj kaj franca televido trovis maljunan Edgar en vilaĝo Maripasoula (ĉe la rivero Lawa, apud landlimo kun Surinamo). En jaro 1964, li decidis reveni al sia edzino en Toulon. Kaj en sia familia urbo li mortis malĝoja post ten jaroj.

Dum legado de "Aventuroj en Gviano" oni unue admiras kuraĝon kaj fortan karakteron de la soleca vojaĝ-esploristo. Sed kiam venas raporto de Maufrais pri lia lasta monato, la leganto estas ŝokita.

Malfacilas kompreni kial – post unu monato de senespera sintreno en varmega, humida klimato, tra densaj arbaro kaj arbustoj, inter la incitaj ofte insektoj – Rajmondo neglektas ĉiujn avertojn.

Li estis jam ekstreme laca, malsana kaj havis nenion por manĝi. Kiam renkontis hazarde indianojn, Maufrais havis ankoraŭ lastan ŝancon reveni kaj saviĝi. Sed li ne haltis kaj obstine daŭrigis tiun marŝon al perejo.



Altrudiĝas la demando: kio motivigas la homon daŭrigi tiel senesperan marŝadon: nesatigebla aventuro, la pionira spirito malkovri novajn lokojn, scivolemo pri la vivo de nekonataj indian-triboj? Ĉu kaŭzis tion la interna bezono venki sian limitecon aŭ ĉu vanta famdeziro? Tio ne plu estis kuraĝo, sed iu obsedo gvidanta al sen-elirejo.



La elektita celo - trairi kelkcent kilometrojn en tiaj cirkonstancoj - estis tute ne reala kaj tia juneca romantikeco devis malvenki kun la ne civilizita kruela naturo.

Kelkaj supozas, ke Rajmondo eniris tiun mensostaton, en kiu li ne plu kapablis racie taksi la situacion. Ja prudenta rezigno pri nereaj revoj ne devas esti taksita laŭ falsa alternativo: venko aŭ morto.

Ni povas starigi la filozofian demandon pri la limo inter braveco kaj frenezo. Sed juĝado pri la aliaj homoj ofte mistrafas, ĉar nekonataj estas misteroj de la homa animo.

Hodiaŭ, tra multaj partoj de la tiam nekonata teritorio, oni veturas sur konstruitaj vojoj. En la suda parto de Gviano, kiun Rajmond Maufrasi planis trairi, troviĝas nuntempe Nacia Parko Tumucmaque (Parc National Amazonien de Guyane). Lige kun la translima *Parque Nacional Montanhas do Tumucumaque* en Brazilo, ĝi formas la plej grandan tropik-arbaran rezervejon en la mondo.

La parkon ofte vizitas eksterlandaj turistoj, sed en la 1950aj jaroj tiu regiono estis danĝera sovaĝejo, tute ne penetrebla. Leginte ambaŭ artikolojn, vi povas kompari, kiel grandaj ŝanĝoj okazis en tiu tropika arbarego dum lastaj jardekoj.



Antaŭ du jaroj estis produktita "La vie pure" (*La pura vivo*), 93-minuta aktorfilmo pri la vojaĝoj de Raymond Maufrais. Vi povas rigardi la du-minutan informon pri tio: https://www.youtube.com/watch?v=m2be_RLjsX0.